


**Doktoro Alan Fantom 1941-2018**

Forpasis lastatempe en Hungerford Alan Fantom, iama membro kaj oficulo de Londona Esperanto-Klubo. Ĉar li loĝadis, post emeritiĝo iom frue okazinta, en Newbury, Alan ĉesis ek de 1995 fidele vizitadi la klubon, kaj tial nur malmultaj klubanoj nunepokaj iam lin renkontis. Antaŭ tiam li tamen vigle partoprenis en, kaj mem kontribuis al, multaj eventoj klubaj. *Londono Vokas 1903-1978*, histori-libro pri LEK, mencias interalie ke Alan en 1970 elektiĝis kiel unu el du Sociaj Sekretarioj, kiuj kunlabore organizis teatrajn vizitojn kaj ekskursojn al lokoj interesaj; ke li prezentis en 1975 muzik-recitalon (supozeble pianan, ĉar tiun instrumenton li ludis virtuoze); ke li "cerbumigis" klubanojn per primuzika kvizo, okazinta en 1977; kaj ke dum la dua duono de la jaroj sepdekaj li oficis kiel kluba Kasisto. Kvankam oni ĉi tion ne menciis en *Londono Vokas*, Alan ankaŭ kontribuis grave al la sukceso de la 56a Universala Kongreso de Esperanto (Londono, 1971) per sia agado kiel Belarta Direktoro.

Dum sia klubaneco, Alan Fantom laboris profesie kiel scienca esploristo ĉe Post Office Research Station, en la kampo de komunikado per elektromagnetaj radioj. Li verkis pri tiu temo libron (*Radio Frequency and Microwave Power Measurement*) kiu baldaŭ fariĝis, kaj eĉ ankoraŭ restas, ŝlosila konsult-libro pri la temo.

Lia familia nomo estas ja bone konata en LEK, ĉar Alan estis frato de klubano Ian, kaj do bofrato de Heleno, nia Honora Vic-Prezidanto. La membraro de Londona Esperanto-Klubo petas ke ili ambaŭ, kaj ĉiuj aliaj familianoj, akceptu niajn plej sincerajn kondolencojn.

Desegno fare de Karlo Bartoŝik

**Kluba Programo:****septembro:**

- 7 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)
- 14 *Ludvespero* – gvidata de Matt Peperell (Dioramo) (1800h Konsilantaro)
- 21 Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)
- 28 John Wells: *Lingva Seminario* (Dioramo)

**oktobro:**

- 5 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)

12 Ariel Bonkorpa: *Ĉu ekzistas normo por la prononcado de Esperanto?* (Dioramo) (1800h Konsilantaro)

19 Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)

26 John Wells – *Lingva Seminario* (Dioramo)

**novembro:**

2 Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a oktobro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:  
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,  
NW1 3FE (por kunveno kun programo);  
Ibis London City - Shoreditch Hotel, 5 Commercial St,  
London E1 6BF (por diskutvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:

18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido  
19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero  
20:15 - 20:45 paŭzo  
20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la  
ĉefprogramero  
22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria",  
"Northern"), Euston Square ("Hammersmith & City",  
"Circle"), Regents Park ("Bakerloo").

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390,  
453, C2.

Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East - uzu la  
eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith &  
City", "District"); Aldgate (linioj "Circle"  
"Metropolitan").

Busoj: 15, 25, 67, 115, 135, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo: <http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346


rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre); Sudorienta:

Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14

7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.



Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Chris Lewis, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry\_page@btinternet.com, anica\_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

## Matematikistinoj

(prelego de Terry Page, 10 aŭgusto)

Kion komununan vi rimarkis inter jenaj nomoj: Eŭklido, Pitagoro, Kartezio, Gaŭso, Turingo, Hilberto, Paskalo, Rimano, Lagranĝo? Ke ĉiu estas estas matematikisto? Jes ja! Ke ĉiu sufiĉe eminentas por ke PIV registru esperant-lingvan version de la nomo? Denove jes! Kaj ke temas senescepte pri nomoj de *viroj*? Gratulon – triafoje jes! Nu, ĉar en la koncerna listo mankas ajna virina nomo, oni eble induktus, ke eminentaj matematikistinoj (same kiel grifoj, unikornoj kaj drakoj) kvankam ja imageblaj, en realo ne ekzistas.

Per sia ĵusa prezento, Terry Page tamen konatigis al klubanoj ses divers-nacianinojn, kiuj per propraj klopodoj signifoplene progresigis matematikon: francinon Sophie, kies ekvaciojn kaj solvojn akceptis profesoroj nur ĉar ŝi uzis kaŝnomon viran; anglinon Ada, filinon de poeto Lordo Byron kaj verkinton de praa komputil-programo; rusinon Sonja, kiu devis fikcie edziniĝi, por ke ŝi povu vojaĝi eksterlande, doktoriĝi pri matematiko kaj fariĝi universitata profesoro; germaninon Emmy, kies teoremo ebligis ke Ejnŝtejno ampleksigu sian Teorion de la Relativeco, kaj kiu fuĝis al usono pro minaco de nazia kontraŭ-judismo; usonaninon Julia, kiu konjektis metodon por solvi bazan problemon pri ekvacioj kaj, kunlabore kun juna ruso kaj aliaj, sukcesis tion plenumi; kaj iraninaninon Maryam kiu, antaŭ morto multe tro junaĝa, fariĝis profesoro en du usonaj universitatoj (Princeton kaj Stanford) kaj en 2014 ricevis Fields Medal, kvazaŭa Nobel-premio por esplorado matematika.

Oni kredu, do, je matematikistinoj, ĉar homoj tiaj ja pruveble ekzistas!